

# Eŭropa Bulteno

Septembro 2013, Numero 130

## LA PAĜARO DE EEU-KONGRESO EN RIJEKA AKTIVIĜIS

EEU funkciigis la paĝaron de la 10- kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio kiu okazos en Rijeka (Kroatio) de la 6-a ĝis la 12-a de julio 2014. Vi povas tie legi ĉion plej gravan pri la kongreso kaj pri la urbo Rijeka. Ankaŭ eblas rete aliĝi. La plej malmultekosta aliĝlimdato estas la 30-a de oktobro. Jen la adreso: <http://eeu-kongreso.webnode.com//>



La 17-an de septembro okazis en Rijeka la unua konsido de Loka Kongresa Komitato en kiu oni elektis sinjoron Boris Di Costanza kiel prezidanton. Samtage okazis vizito de la delegitaro de la Komitato (Zlatko kaj Maja Tišljari kaj Boris Di Costanzo) al la reprezentanto de la Promirsko-Goranska regiono en kiu estas ankaŭ Rijeka, sinjoro Gianni Juras. En la interparolo li proponis tuj sendi monpetojn al la Regiona Konkurso kaj poste en komenco de 2014 peti pri aŭspicio.

Maja Tišljari

## **EŬROPA ESPERANTO-UNIO SUBTENIS PROPONON DE PREZIDANTO DE GERMANIO POR KOMUNA LINGVO POR CIVITANOJ DE EŬROPO EN EKONOMIA FORUMO EN KRYNICA**

Jam la 9an fojon dank' al oferema kaj senlaca klopodo de sinjorino Halina Komar en kontaktoj kun ĉeforganizanto de la Ekonomia Forumo (EF), la Instituto de Orientaj Studoj, organizanto de EF kaj precipe komprenemo de ĝia prezidanto Zygmund Berdychowski, kiu klare vidas gravecon de ideoj, rekomendoj kaj iniciatoj de la Eŭropa Esperanto Unio (EEU) Peter Baláž de Edukado@Interreto organize sperta kun sia teamo inter la 3-a kaj la 5a de septembro 2013 sukcese reprezentis EEU partopreni en la 23a EF en Krynica (Pollando), kies ĉefa temo estis „Al nova interkonsento”.



La Ekonomia Forumon malfermis Donald Tusk, ĉefministro de Pollando, kiu bonvenigis Robert Fico, ĉefministron de Slovakio, Valdis Dombrovskis, ĉefministron de Latvio kaj Alexandr Vilkul, Vic-ĉefministron de Ukrainio. La

ĉefministroj parolis pri ekonomia krizo kaj problemoj en EU, kiujn eblas superi nur per pli proksima ekonomia kunlaboro. La prioritato estas malaltigi senlaborecon en EU aparte de junularo, serĉi solvojn por stimuli ekonomian kreskon, akcepti mekanismon por certigi stabilecon de "eŭroareo" kaj komuna pagrimedo euro. Ili informis pri situacio en siaj landoj kaj agadoj por venki problemojn de financa kaj ekonomia krizo, ideojn por plua eŭropa integriĝo kaj estonta arkitekturo de EU. La vic-ĉefministro de Ukrainio esprimis esperon, ke ĉiuj eŭropaj landoj estos laŭgrade integritaj en la unuiĝanta Eŭropo. Li aldonis ke por kunlaboro ekzistas grandaj eblecoj sur multaj kampoj. Li kredas, ke Ukrainio en novembro 2013 subskribos Asocian Traktaton kun EU.

Fine de la malferma kunsido la ĉefministro de Pollando anoncis ĉiujare donatan premion "Homo de la Jaro". En la jaro 2011 la premio estis donita al Vlad Filatov, ĉefministro de Moldavio, en la jaro 2012 al Ivo Josipovic, ĉefministro de Kroatio kaj en la jaro 2013 al Robert Fico, ĉefministro de Slovakio.

Ĉi-jare partoprenis la EF-on proksimume 2000 partoprenantoj, inter kiuj estis pintaj ŝtataj kaj politikaj reprezentantoj, kiel ankaŭ gvidantoj de entreprenoj, asocioj, akademiaj rondoj, neregistaraj organizaĵoj de Pollando, landoj kaj institucioj de EU, Eŭropo kaj aliaj landoj de la mondo. Akreditaj estis proksimume 400 ĵurnalistoj. Dum la EF okazis 6 plekunsidaj diskutpaneloj kaj 120 diskutpaneloj dediĉitaj al diversaj subtemoj.

La EF-on partoprenis ankaŭ Lech Walesa, eksa prezidento de Pollando, Jaroslaw Kaczynski, eksa ĉefministro de Pollando, Janusz Lewandowski, Komisionano de EU por buĝeto kaj financado de programoj, eksaj komisionanoj de EU Günter Verheugen kaj Ján Figel'. Inter partoprenantoj estis pluraj aktualaj kaj eksaj prezidantoj kaj vicprezidantoj de registaroj, naciaj parlamentoj kaj de la Eŭropa Parlamento, ministroj, parlamentanoj, ĉefaj manaĝeroj de



internaciaj kaj naciaj organizoj, akademianoj, reprezentantoj de profesiaj asocioj, neregistaraj organizoj kaj amaskomunikiloj en Pollando, landoj de EU kaj la mondo.

Plenkunsidaj paneloj estis precipe dediĉitaj al financaj kaj ekonomiaj temoj, serĉado de eliroj kaj solvoj el longdaŭra financa kaj ekonomia krizo en EU, Eŭropo kaj la mondo.

Partoprenantojn aparte intersigis la ferma

plenkunsido pri temo "Kial ni bezonas historion en Eŭropo?", kiu tuŝis tre tiklajn historiajn, politikajn temojn kaj nesolvitajn problemojn de la eŭropa integriĝo. En la panelo partoprenis Boris Tadić, eksa prezidento de Serbio, Markus Meckel, eksa ministro de Eksterlandaj Aferoj de Germanio, Petra Hulová, verkistino el Ĉeĥio kaj Tadeusz Pieronek, Membro de Politika Konsilio de EF en Krynica. Ili emfazis, ke ne eblas plu prokrasti tiklajn historiajn kaj politikajn temojn, sed estas necese serĉi en tuteŭropa debato akcepteblajn solvojn por ĉiuj landoj kaj iliaj civitanoj, ĉar sen ili oni ne povas sukcese daŭrigi aktualan unuigadon de Eŭropo. La panelistoj konsentis pri bezono, kiel eble plej frue interkonsenti kaj fermi malĝojan pasintecon de Eŭropo precipe en la 20-a jarcento kaj estos pli bone ke landoj koncentriĝu al estonteco kaj daŭrigo de la procezo de eŭropa integriĝo. Konsekvencoj kaj influo de historio je landoj de centra Eŭropo restas ĝis nun tre fortaj kaj gravaj. Tragedia pasinteco de Eŭropo, naciaj antagonismoj kaj ideologiaj konfliktoj ankoraŭ nuntempe negative influas stabilecon sur la kontinento. La panelistoj komune konkludis, ke grava antaŭkondiĉo por atingi interkonsenton pri la pasinteco estas klare esprimiĝi al eŭropa heredaĵo kaj respondi nesolvitajn demandojn, ke en estonteco estu ebleco konstrui je solida fundamento koheran kaj unuigantan Eŭropon kaj komunan eŭropan identecon de civitanoj. Boris Tadić, eksa prezidento de Serbio, en sia parolado kaj diskuto akcentis ke ne eblas daŭrigi konstantan reciprokan kulpigadon inter ŝtatoj. EU estas la plej bona modelo por konstruado de paco, estonteco de la kontinento kaj stabileco en Balkanio. En la tutmondiĝo kreskas novaj potencoj kaj EU daŭre diskutas pri tio, ĉu daŭrigi la plivastigon de EU aŭ ne. Eŭropo bezonas novajn gvidantojn por nova politiko ke ĝi ne ripetu erarojn de la pasinteco kaj lernu de la disfalo de iama Jugoslavio. Necesas konscii la fakton ke en ĉiu nacio kaj etno estas kaŝitaj emocioj, kiuj povas tre facile ekflagri kaj transiĝi al naciismo, malamo kaj eĉ al milito. Li diris, "mi eĉ en sonĝo ne pensis ke serboj batalos kontraŭ kroatoj inter kiuj mi havas multajn bonajn amikojn". Necesas respekti kaj protekti ĉiujn identecojn de civitanoj de EU/Eŭropo, sed samtempe formi kaj plifortigi ilian komunan eŭropan konscion kaj identecon. Pro tiu kaŭzo necesas dediĉi pli grandan atenton al reciproka ekkonado kaj

konstruado de konfido inter civitanoj de malsamaj naciecoj kaj etnoj. Ne eblas ignori nian eŭropan historion. Tiu ne devus dividi nin ke ni ne ripetu tragikajn erarojn de nia pasinteco.

Krom ekonomiaj temoj ĉi-forume enkadre de "Eŭropa Jaro de Civitanoj" deklarita de EU, klare eksonis voĉoj de plej altaj politikistoj, ke en serĉado de solvoj kaj eliroj de la krizo estas bezonate engaĝi civitanojn, plifortigi ilian eŭropan konscion, civitanan socion kaj demokration en ĉiuj sferoj de la vivo. Tio estas neprokrastebla bezono por malpermesi pluan malkreskon de civitana apogo al EU kaj eŭropa integriĝo, kreskon de ekstremismo, radikalismo, naciismo kaj interetna maltoleremo inter civitanoj, streĉoj kaj konfliktoj minacantaj koherencecon de EU kaj ĝian ekziston.



En pluraj diskutpaneloj pri serĉado de komunaj eliroj kaj solvoj el la financa kaj ekonomia krizo en EU, estis menciita plifortigita kaj proksima ekonomia kunlaboro inter landoj de 'eŭroareo' kaj EU, komuna ekonomia regado en EU/Eŭropo, kiu povus je politika nivelo transiri al kreado de federacia strukturo en Eŭropo. Ĝia celo devus esti, ke Eŭropo estu pli konkurenckapabla en la

tutmondiĝanta mondo kaj rilate al naskiĝantaj novaj ekonomiaj kaj politikaj potencoj en la mondo. Ĝi estas por EU/Eŭropo ne nur grava ekonomia defio, sed ĉefe politika defio.

Al tiu ĉi temo estis dediĉita ankaŭ diskutpanelo organizita de EEU pri la temo "Federacia Eŭropo: ĉu kun komuna lingvo por ties civitanoj?", kun rigardo al pliproksimigo de civitanoj al EU, ilia angaĝado en eŭropa integriĝo, formado kaj plifortigo de eŭropa konscio de civitanoj. Ĝiaj membroj estis Georg Milbradt, eksa ĉefministro de Saksio en Germanio kaj profesoro de Ekonomia Teknika Universitato en Dresdeno en Germanio, Artur Sosna, prezidanto de Luksemburga-Pola Komerca Klubo kaj instruisto en la lingva lernejo Berlitz, Peter Baláž, prezidanto de civitana organizo Edukado@Interreto kaj kunordiganto de pluraj interretaj lingvoinstruaj kaj edukaj projektoj financataj de Eŭropa Komisiono, Halina Komar, prezidantino de Centro de Interkultura Edukado en Nowy Sacz en Pollando kaj Jozef Reinvar, el Ministerio de Eksterlandaj kaj Eŭropaj Aferoj de Slovakio kaj membro de Civitana Socia Platformo de EU por Multlingvismo.

La diskutpanelo kontinuigis ideojn de la parolado de Joachim Gauck, prezidento de Germanio, en Berlino la 22-an de februaro 2013, kiu rekomendis kreon de komuna eŭropa civitana diskutplatformo al kiu estas bezonata komuna lingvo por ĉiuj civitanoj. Pri tio, kiu lingvo tio estus, oni devus diskuti en tuteŭropa debato. En enkonduka kontribuo Jozef Reinvar akcentis, ke EU dum pasintaj 10 jaroj malsukcesis almenaŭ parte plenumi ambician rekomendon de la Eŭropa Konsilio en Barcelono en 2002, ke ĉiu civitano krom gepatra lingvo

scipovu almenaŭ du fremdajn lingvojn, plibonigi instruadon kaj lingvokapablon de fremdaj lingvoj kaj plivastigi plurlingvismon. Li atentigis pri la fakto, ke se EU volas sukcese progresi en la eŭropa integriĝo, kunaktivigi civitanojn kaj plifortigi ilian eŭropan konscion, ĝi devas ŝanĝi aktualan libermerkatan lingvan kaj kulturen politikon en EU kaj anstataŭigi ĝin per nova komuna justa kaj efektiva lingva politiko. La panelistoj atentigis, ke nuna superregado de la angla en EU malhelpas instruadon, aplikon kaj disvolvigon de aliaj EU-lingvoj. Ekzistas granda diferenco inter lingva egaleco "de iure", laŭ la valida prioritata leĝaro de EU kaj "de facto" selektado de lingvoj en ĉiutaga praktiko, laŭ grandeco de lando, nombro de ĝiaj loĝantoj kaj ekonomia potenco, ktp. Lingvistoj ĝis nun ne prezentis proponojn kiel eblus esence plibonigi instruadon de fremdaj lingvoj kaj lingvokapabloj. La Civitana Socia Platformo de EU pri Multlingvismo rekomendis por plibonigo de malbona stato en EU sukcesan modelan projekton lanĉitan en 2006 en 4 bazlernejoj en Britio, kiel enkondukon en lernadon de fremdaj lingvoj, respektive lingvo-orientigan instruadon "Springboard to Languages" ([www.springboard2languages.org](http://www.springboard2languages.org)), en kiu estas uzata gramatiko de Esperanto (ĝia propedeŭtika valoro) kaj 500 radikoj de plej ofte uzataj vortoj en eŭropaj lingvoj. Halina Komar rilate al la rekomendo de la germana prezidanto diris, ke civitanoj de EU/Eŭropo bezonas por komuna kaj efika komunikado unu facile kaj rapide lerneblan lingvon. Pollando estas naskiĝloko de la neŭtrala internacia lingvo Esperanto, kiu estis iniciatita antaŭ 126 jaroj por komunikado de ĉiuj homoj de Eŭropo kaj la mondo. En la Pola Parlamento en marto 2013 estis kreita parlamenta grupo por subteno de Esperanto, kiu estas kultura heredaĵo de Pollando kaj EU. La Parlamentan grupon gvidas prof. Edmund Wittbroad, senatano kaj eksa ministro de edukado. La celo de tiu ĉi grupo estas enskribi Esperanton en liston de nemateriaj kulturaj heredaĵoj de Pollando kaj oferti tiun ĉi neŭtralan lingvon helpe al la eŭropa integriĝo kaj kiel solvon de problemoj rilate lingvan komunikadon en EU/Eŭropo por ĉiuj civitanoj. Komence de la EF post la diskutpanelo „Gvidantoj de estonteco“, en kiu oni diskutis pri novaj junaj kapablaj novigaj gvidantoj al kiuj oni devas doni ŝancon, mi alparolis Ján Figel', vic-prezidanton de Nacia Konsilio de Slovakio kaj eksan komisionanon de EU por Edukado, Kulturo kaj Multlingvismo (2004-2009), kiu estis panelisto. Mi memorigis al li ke fremdlingva instruado kaj multlingvismo en EU eĉ post 10-jara subtenado ne pliboniĝis, sed



male, kion montris esploro de Eurobarometro en 2012 pri „Multlingvismo en Eŭropo“ komparita kun rezultoj de la sama esploro farita en 2005. Tiu ĉi malbona situacio postulas novigajn alirojn, solvojn, projektojn, kiuj helpas ŝanĝi la negativan tendencon. Mi informis lin ke ekde 2009 Eŭropa Komisiono komencis mafermiĝi al novaj aliroj kaj novigaj ideoj. Tiam estis fondita Civitana Socia Platformo de EU por Multlingvismo al kiu estis invita

ankaŭ EEU. Mi diris al li ke danke al Esperanto kaj portalo por ĝia reta lernado en 37 lingvoj [www.lernu.net](http://www.lernu.net) kaj noviga agado de la civitana asocio Edukado@Interreto, kiu havas sian sidejon en Partizánske, Slovakio fariĝis modela EU lando por subteno de multlingvismo. Edukado@Interreto preparis tre sukcesan multlingvan portalon por multlingva instruado de la slovakaj informado pri Slovakio „Slovakie.eu“ [www.slovakie.eu](http://www.slovakie.eu), kiun finacis Eŭropa Komisiono de komenco kaj finance subtenos ankaŭ ĝian duan etapon. Samtempe mi informis lin pri aliaj projektoj de Edukado@Interreto (ekz. [espa2.eu](http://espa2.eu), [deutsch.info](http://deutsch.info), [lingvo.info](http://lingvo.info) kaj aliajn) kiujn financis/as/os Eŭropa Komisiono. Mi diris al li ke estis granda domaĝo ke dum li estis en la posteno de EU komisionano, lia sekretariejo kaj li mem havis grandajn antaŭjuĝojn kontraŭ Esperanto. Ĉar la salono en kiu okazis la menciita diskutpanelo estis proksime al EEU stando mi invitis lin viziti ĝin. Tie mi interkonatigis lin kun Petro Baláž, juna noviga homo, kiu parolis en la menciita diskutpanelo kaj Halina Komar danke al kiu, Zygmunt Berdychowski, prezidanto de EF, jam 8 jaroj senpage permesas al EEU havi standon en EF. Ján Figel' estis surprizita pri bele aranĝita EEU stando, plena da lernolibroj, libroj, DVD, CD, revuoj, informaj kaj reklamaj materialoj pri Esperanto. Li sincere diris ke li tiam ne havis objektivajn informojn pri Esperanto. Petro kaj mi informis lin pri nia diskutpanelo kaj aliaj aferoj kaj ankaŭ pri iniciato en la Pola Parlamento kaj la kreita parlamenta grupo por subteno al Esperanto kiel kultura heredaĵo de Pollando kaj EU, kiun gvidas Prof. Edmund Wittbrod, senatano kaj eksa ministro de edukado de Pollando. Ján Figel' informis nin, ke li konas prof. Wittbrod de iliaj kunsidoj en la Konsilio de Eŭropo. Fine de nia interparolo li donis sian vizitkarton al Petro kaj diris ke ni vizitu lin en la Nacia Konsilio kaj estus bone daŭrigi nian diskuton. Malgraŭ tio ke Ján Figel' nuntempe ne havas altan postenon en EU, sed havas altan postenon en slovakaj parlamento kaj politika scenejo (nuntempe en opozicio) li povus fariĝi subtenanto kaj aliancano por prof. Wittbrod kaj esti membro de simila parlamenta grupo por subteni Esperanton en Slovakio kaj Viŝegradaj landoj kaj pli poste prezenti ĝin ankaŭ je eŭropa nivelo en EU.

#### Taksado kaj rekomendoj

La EEU teamo taksas ke la ĉi-jara partopreno en la EF estis sukcesa, sed samtempe opinias ke ĝi povus esti certe pli sukcesa se ne okazus lastmomenta nuligo de partopreno de prof. Edmund Wittbrod, prezidanto de Pola Parlamenta Grupo por subteno de Esperanto, en nia diskutpanelo pro lia urĝa eksterlanda vojaĝo. Surbaze de la ĉi-jare akiritaj organizaj spertoj, por ke nia venontjara partopreno en EF estu pli sukcesa, mi rekomendas ke EEU komencu preparojn de sia partopreno en EF jam en januaro 2014:

1. Necesas interkonsenti kun UEA, ESF kaj aliaj institucioj pri financa subteno de EEU partopreno en EF.
2. Sufiĉe frue proponi temon de nia diskutpanelo kunligitan kun la ĉeftemo de EF kaj nomumi profesie spertajn panelistojn kaj samtempe ankaŭ iliajn anstataŭantojn (en kazo de neatendita nuligo),
3. Por akiri partoprenon de politikistoj (al kelkaj el ili kiuj favoras aŭ rekte subtenas Esperanton, EEU jam havas rektan kontakton), rekomendindas, ke politikisto(j) nomumu ankaŭ sian anstataŭanto(j)n en kazo de neatendita, lastmomenta nuligo de ilia partopreno pro urĝaj labordevoj,
4. Organizati diskutpanelojn pri kulturo, lingvoj, demokratio, homaj rajtoj, egalrajteco kaj aliaj proksimaj subtemoj kun propono kunlabori organizi sinsekve 3 aŭ 4 diskutpanelojn, kiuj povus esti en EF prezentitaj kiel konferenco por evoluigo de kultura dimensio EU/Eŭropo. Pere de kunlaboro kun aliaj institucioj kaj fondaĵoj, estontaj aliancanoj ni povus plibonigi nian partoprenon kaj prezenton en EF.
5. Post 8-jara partopreno oni devas investi por venontaj jaroj certan sumon en preparo de pli kvalitaj banderoloj, afiŝoj, informaj kaj reklamaj materialoj. Gravus profesiigi nian

partoprenon ankaŭ de materia flanko, por ke nia stando en ontaj jaroj el marketinga vidpunkto prezentu EEU kaj Esperanto-movadon profesie, alloge kaj per modernaj formoj kaj reklamiloj.

La 8-jara partopreno de EEU en tiu ĉi tradicia monda evento klare montris, ke ĝi estas eminenta kaj efika ebleco (dank' al subteno de Zygmund Berdychowski, Prezidanto de EF, kaj lia permeso senpage partopreni, per kiu EEU ŝparas proksimume 8000 eurojn) prezenti al ekstermovadanoj ideojn kaj rekomendojn de EEU, Esperanton kaj ĝian movadon. Partoprenado de EEU en EF estas kontribuo al tuteŭropa diskuto pri subteno por vastigo de plurlingvismo, prezento de rolo de Esperanto en plibonigo de lingva instruado, egalrajtigo de ĉiuj lingvoj kaj demokratiigo de lingva kaj kultura politiko en Eŭropo.



La ĉi-jara EEU teamo en la EF rekomendas al prezidanto de EEU sendi al prezidanto de EF leteron por esprimi al li dankon por lia ĝisnuna subteno de nia partopreno en EF, informi lin pri aktuala diversspeca agado de EEU, kiel membro de la Civitana Socia Platformo de EU por Multlingvismo. En sia letero li povus proponi kunlaboron de EEU kun aliaj partoprenantaj institucioj kaj fondaĵoj por evoluigi kulturalan dimension

en kadre de eŭropa integriĝo, kiu ekde ĝia komenco en 1957 grave postrestas ekonomian kaj pacan dimensiojn, ĉar ĝi restis ĝis nun je nacia nivelo.

Nia EEU diskutpanelo en la EF havis pozitivan efikon, ĉar en la presnovaĵo de la 23a EF la 20-an de septembro 2013 estis publikita artikolo titolita „La Ekonomiisto: Poliglota Eŭropo“ (angle The Economist: Polyglot Europe). La artikolo estas legebla je la e-adreso:

<http://www.forum-ekonomiczne.pl/xxiii-economic-forum-2013/the-economist-polyglot-europe/?lang=en>

EEU diskutpanelo evidente stimulis iun en „The Economist“, por skribi artikolon pri lingvaj problemoj en EU. La aŭtoro komencas per simila demando, kiel estis titolita EEU diskutpanelo. „Ĉu estas ebla politika unuiĝo sen komuna lingvo?“ En la artikolo estas menciitaj ligvaj problemoj en EU/Eŭropo (multlingvismo, dominado de granda(j) lingvo(j), ktp.). Sed la aŭtoro, plej verŝajne anglo, mencias nenion pri nia diskutpanelo, Esperanto aŭ ia neutrala solvo, kaŝas tiujn ĉi faktojn. Malgraŭ tio, pozitiva fakto estas, ke la aŭtoro okupiĝis pri tiu ĉi politike tikla temo kaj atentigis pri ĝi. Laŭ mi estas klare, ke sen ĝia justa solvo oni ne povos krei en EU politikan union aŭ federacian Eŭropon, kiu povus longdaŭre ekzisti kaj funkcii.

Josef Reinart

## EŬROPA LINGVA TAGO



Okaze de Eŭropa Lingva Tago (la 26-a de septembro) en la listo de eventoj rilataj al tiu tago sur la paĝaro de Konsilio de Eŭropo troviĝas 12 eventoj kiuj en sia nomo havas Esperanton, inter entute 427 organizitaj ĉefe en Eŭropo kaj en la reto. Do la esperantaj eventoj reprezentas 3% de ĉiuj. La 12 espeantaj aranĝoj okazis en 6 landoj kaj en la reto (Pollando, Hungario, Aŭstrio, Germanio, Slovenio, Brazilo). Vidu ĉe:

<http://edl.ecml.at/Events/EventsDatabase/tabid/1772/language/en-GB/Default.aspx>

Zlatko Tišljarić

## DEKLARO DE ITALA E-FEDERACIO OKAZE DE EŬROPA TAGO DE LINGVOJ



Ekde 2001 Eŭropo dediĉas la 26an de septembro al lingva riĉeco. Ene de la limoj de la Unio estas 24 oficialaj lingvoj kaj multnombraj regionaj

aŭ minoritataj lingvoj, kaj ni ne forgesu ankaŭ la kontribuon de la novaj eŭropanoj. Itala Esperanto-Federacio ([www.esperanto.it](http://www.esperanto.it)) partoprenas kaj substrekas la neceson pliinteresiĝi civitanecon per multlingvismo, kultura diverseco, interkompreno inter popoloj kaj lernado de lingvoj.

La asocio ankaŭ bonvenigas la decidon de la tribunalo de Eŭropa Unio, kiu agnoskas diskriminacia la publikigadon de la labor-anoncoj nur en la angla, la franca aŭ la germana, ĉar tio kaŭzas malavantaĝon por ne-denaskaj parolantoj de tiuj lingvoj. Sekve ĉiuj koncernaj dokumentoj devas esti eldonitaj en la 24 oficialaj EU-lingvoj. Tiu juĝo estas rezulto de plendoj prezentitaj de italaj registaraj agentejoj kontraŭ la Eŭropa Komisiono, kiu verkis en 2008-2009 kelkajn anoncojn por laboraj postenoj nur en la angla, franca kaj germana.

Toleremo, respekto por aliaj lingvoj kaj kulturoj estas fundamentoj de la Esperanto-movado: la internacia lingvo havas neŭtralan fundamenton, sur kiu homoj povas komuniki sen diskriminacioj kaj frate. Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto, ekmaturigis tiujn principojn en sia hejmurbo, Bjalistoko, kie vivis kune poloj, rusoj, germanoj, tataroj kaj judoj. Lingvoj estis kaj estas grava ilo por la partopreno en la soci-politika kaj kultura vivo. Diskriminacii eĉ nur unu el ili egalas al domaĝado de la tuta komunumo.



## EN MARIBOR PREZENTO DE NOVA LIBRO ELDONITA DE EEU

La 25-an de septembro en Maribor Esperanto Societo kaj Asocio por Eŭropa Konscio prezentis la ĉi-jare aperintan 230-paĝan libron „Kia estus la nuna Eŭropo sen EU?”



La prezento estis farita okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj en la Loka Komunumo Centro por la ĝenerala publiko. La libro estas rezulto de la samnoma projekto efektivigita de EEU kies unu el la partneroj estis Asocio por Eŭropa Konscio kun la sidejo en Maribor kaj estas seslingva. En ĝi oni povas plurlingve legi referaĵojn de ĉiuj 13 prelegantoj dum la pasintjare okazinta eŭropa konferenco en Triesto pri kiu ni skribis al ja maja numero 2012 en nia Bulteno.

La libron prezentis Melita Cimerman, iama vicurbestrino de la urbo Maribor, aparte atentigante pri la prelegoj de eksaj prezidantoj de Slovenio kaj Kroatio (Kuĉan kaj Mesić) kaj de itala parlamentano Giorgio Rossetti. Ĉeestis dudeko da aŭskultantoj.

Zlatko Tišljar


## LOKA E-AGADO LONGE NEGLEKTATA

La nuna stato de loka ensocieta kaj enkluba agado estas komplete alia ol antaŭ kelkaj jardekoj. Esence ŝajnas ke tiu formo de esperantista vivo estas esence endanĝerigita kaj mortanta. Dum la unua jarcento de la Movado esenca laboro kaj ĉefe la flegado de la lingvo okazis en lokaj Esperanto-kluboĵ. Ne eblis kontakti alilandanojn alimaniere ol iri al kongresoj aŭ eventuale vojaĝi al aliaj landoj, por kio plej multaj ne havis monon aŭ tempon aŭ ambaŭ, multaj vivis eĉ en reĝimoj kiuj ne permesis al ili vojaĝi eksterlanden foje eĉ ne gastigi fremdlandanojn. Sekve oni lernis E-on en la lokaj kluboj, ekzercis ĝin en kursoj kaj societaj kunvenoj. Lokaj kluboj ofte estis grandaj, ĝenerale kelkdeko da homoj membris kaj ie-tie eĉ kelkcento.

La informadika revolucio kiu komplete teknologie ŝanĝis la mondon dum la lastaj dudek-tridek jaroj alportis efektive gravan pozitivan novaĵon por esperantistoj. Ne plu necesas ien ajn vojaĝi por renkontiĝi vive kun esperantistoj aŭ eĉ pluraj esperantistoj alilandaj kaj ne plu

necesas iri al la societoj por tie renkonti E-parolantojn. Samkiel okazis rilate grandan plimulton en ĉiuspecaj amatoraj agadkampoj tiel ankaŭ pri la E-movado: la klasika ensocieta aktiveco, do regula renkontiĝado de la membraro en iu loko (ĉu la propra aŭ luita klubejo, ĉu luita publika loko - kutime restoracioj aŭ kafejoj) ĉiam pli dezertiĝas. Venadas ĉiam malpli da membroj, maljunaj aŭ pro morto aŭ malsaniĝo ne plu povas subteni la tradicion, la junaj estas ĉarmitaj de la komputila kaj reta mondo de kiu neniu plu povas deŝiri ilin.

Ĉie ni trovas tiun fenomenon. Mi citos nur kelkajn. En Hamburgo la E-societo posedis belan domon kaj kiam ĝi estis aĉetita en sepdekaj jaroj, la societo havis pli ol 50 membrojn kiuj regule renkontiĝadis. Antaŭ deko da jaroj ne plu eblis pagi la kostojn de la ejoj kiujn neniu plu vizitis kaj ili estis devigitaj vendi ĝin. En Maribor en Slovenio en la jaro 1986 la societo nombris pli ol 100 regulajn membrojn kaj pliajn tricent kiuj estis lernantoj de E-o en diversaj lernejoj kaj ligitaj al la societo. Nun la societo havas dudekon da pagantaj membroj kaj dekon da aktivaj. En Zagrebo Studenta E-klubo inter 1960 kaj 1980 membris daŭre inter 50 kaj 100 junaj membroj, nuntempe ĝi apenaŭ montras vivsignojn. Fojfoje kunvenas du aŭ tri membroj. En Londono Ian Fantom invitas la publikon: Ĉu neniu volas savi la Londonan klubon? Ĝi havas luitajn ejojn kaj sufiĉe da mono, tamen praktike ne plu havas membrojn ĉar al la kunvenoj venas neniu. Pri la sveda movado vi povas trovi artikolon ke ĝi simile ŝrupas ĉie, pri la estona movado oni timas ke ĝi reale estingiĝas, en Grekio praktike ne ekzistas societoj, nur kelkaj aktivaj unuopuloj... Eblus daŭre paroli nur pri tiaj kazoj. Mi estas sufiĉe certa ke ekzistas neniu societo plu en la tradicia E-movado de Eŭropo, Nordameriko kaj Oceanio en kiu ne okazas la samo. Iom malsame estas nur en kelkaj afrikaj landoj, aziaj kaj sudamerikaj, sed ankaŭ tie jam montriĝas la sama tendenco.



Ĉu la loka movado estas kondamnita al morto? Ĉu ĝi vere havas tiom da unuoj kiel montras ĉi tiu mapo?

(<http://www.esperantoland.org/grupoj/mapo.php?mapo=15>)

Ĉu ĝi ankoraŭ havas funkcion?

Ŝajnas al mi ke ĉiam malpli, preskaŭ neniun plu. Ĉar la reala viva kontaktado inter esperanto-pasrolantoj okazas nur dum internaciaj aranĝoj kaj kongresoj kiuj ankaŭ estas ĉiam malpli multnombraj.

Tamen la Movado ŝajnas nuntempe havi pli-malpli la saman kvanton da lingvouzantoj. Ili ne plu bezonas E-societojn, la nunaj homoj ne plu trovas tempon por regula renkontiĝado en iu loko, ĉiam je la sama tempo. Lernantoj de la lingvo ne plu havas tempon por dufoje (aŭ unufoje) semajne iri al iu kursejo por tie lerni dum unu aŭ du horoj perdante trioble pli da tempo por atingi tiun lokon kaj reveni hejmen. Ili preferas lerni hejme ĉe komputilo en tempoj de ili difinitaj.

Tamen la oficiala strukturo de la movado daŭre dependas de la pagado de kotizoj. Se funkcias lokaj societo en kiu iu zorgas pri kolektado de membrotizoj, oni povas en la landa asocio sumi ĉiujn membrjn en la societoj kaj diri al UEA kiom da asociaj membroj ekzistas. Sekve la asocia membraro konstante malkreskas kaj multaj landaj asocioj pagas la asociajn membrotizojn ofte minimumajn el la kaso sen havi efektivan membraron nur por ne malaperi el la listo de ekzistant LA-oj.

Ankaŭ individuaj membroj ĉiam pli malmultiĝadas. Se malaperas la membraro, ne estos maniero havi organizaĵon kiu estas organizita baze de membroj konfirmebla per kotizpagado, kaj sekve ne estas maniero reprezenti la movadon al la ekstera mondo. Kiu membro en UNESCO, kiu reprezentos la movadon antaŭ registaroj de unuopaj landoj kaj antaŭ EU-organoj, kiu reprezentos la movadon en pluraj internacia organizaĵoj okupuĝantaj pri lingvo kaj lingva arto?

Malgraŭ tio ke tio ŝajnas formale nesolvebla problemo, mi kredas ke la monda evoluo devigas nin (kaj ne nur nin) komenci pensi kiel restrukturiĝi kaj organiziĝi en iu alia – ne-membra maniero. Kial la organizaĵoj kiel UEA, EEU, SAT ktp, ne povus kalkuli sian membraron per alia maniero: per iu senkotiza membreco atingebla nur per reta aliĝo al la koncerna asocio? Kaj ke la Asocio bazu sian laboron je nova ekonomia maniero: baze de donacoj kaj baze de perlaboro far la profesiaj laborantoj, kiuj anstataŭ la kotizoj komencu esti memfinancataj aktivante kiel poduktantoj de pagataj projektoj sur ĝenerala merkato kaj kial ili ne serĉu manieron esti parte financataj baze de sia informa valoro en la reto? Se tio ne eblas, ĉar evidente ne estas sufiĉa mecenataro aŭ ili ne kapablas elturniĝi sur la merkato, ili transiru al la amatora organizformo. Kompreneble estos grandaj problemoj antaŭ ol la transformiĝo estos sukcesa, ekz. pri kelkaj prizorgoj de posedoj kiuj ne rajtas malaperi kaj tamen postulas daŭrajn kostojn kiel prizorgo de bibliotekoj gravaj kaj arkivoj, sed post krizo ankaŭ tio solviĝos. La gazetaro ĉiukaze transformiĝos ekskluzive al la elektronika formo, sed la kvanto kaj kvalito daŭre kreskos, ĉar ja naskiĝas ne nur gazetoj, sed novaj retaj radioj kaj eĉ televidoj en E. Servoj en la reto estas por Esperantistoj konstante ĉiam pli abundaj kaj en kelkaj sferoj eĉ pli abundaj kaj kvalitaj ol servoj de ŝtatoj en malriĉaj landoj.

Interesan iniciaton faris membroj de la relative nova Esperanto-klubo en urbeto Brežice en Slovenio kiu agas sufiĉe inventeme kaj novamaniere kaj kunvokis slovenajn esperantistojn al konsultiĝo pri la manieroj de loka aktivado. Ĉu ne ankaŭ en aliaj landoj oni faru ion similan?

Zlatko Tišljar

## **TRADUKAJ TROLOJ EN LA MONDA INFORMADO**

Kvankam en la Esperanto-movado dum jardekoj oni ofte atentigis pri stultaj mistradukoj, neniam mi vidis ion pri intenca mistraduko por misprezenti gravajn prelegojn aŭ deklarojn en



la internacia politiko. Tio kompreneble estas multe pli grava. La suba klarigo do devus esti interesa por anglalingvaj Esperantistoj.

Ĝi aperis en Fars News, kaj temas pri intervjuo kun la irana Prezidento Ruhani en la usona televidkanalo CNN

(<http://english.farsnews.com/newstext.aspx?nn=13920703001316>). Fars News aperigas perse la precizajn vortojn direktajn de la Prezidanto, kun preciza traduko en la anglan, kiun mi ĉi tie esperantigis:

*"Mi diris antaŭe, ke mi ne estas historiisto, kaj historiistoj devus specifi, aserti kaj klarigi la aspektojn de historiaj eventoj, sed ĝenerale ni plene kondamnas ajnan krimon plenumitan kontraŭ la homaro tra la historio, inkluzive de la krimo plenumita de la nazioj kaj kontraŭ la judoj kaj la ne-judoj, same kiel se iu krimo estas plenumita kontraŭ iu ajn nacio aŭ iu ajn religio aŭ iu ajn popolo aŭ iu ajn kredo, ni kondamnas tiun krimon kaj genocidon. Tial, tio kion faris la nazioj estas kondamnata, (sed) la aspektoj pri kiuj vi parolis, klarigo de tiuj aspektoj, estas la devo de la historiistoj kaj esploristoj. Mi ne estas histori-erudiciulo."*

Kaj jen la traduko de CNN (kiun mi plue tradukis el la angla):

Mi diris antaŭe, ke mi ne estas historiisto, kaj plue, kiam temas pri parolado pri la dimensioj de la **Holokaŭsto**, estas la historiistoj kiuj devus tion kontempli. Sed ĝenerale mi povas diri al vi, ke iu ajn krimo kiu okazas en la historio kontraŭ la homaro, inkluzive de la krimo kiun plenumis la nazioj kontraŭ la judoj kiel ankaŭ ne-judoj estas **riproĉinda** kaj kondamninda. **Kian ajn krimecon ili plenumis kontraŭ la judoj ni kondamnas; la preno de homa vivo estas malestiminda**, kaj ne faras diferencon, **ĉu tiu vivo estas juda vivo, kristana aŭ islama, por ni estas same, sed la preno de homa vivo estas io, kion nia religio malakceptas, sed tio ne signifas, ke aliflanke vi povas diri ke nazioj plenumis krimon kontraŭ iu grupo, nun do ili devas uzurpi la landon de alia grupo kaj tion okupi. Ankaŭ tiu estas ago kiu devus esti kondamnita. Devus esti egaleca diskutado.**

La grasaj partoj estas aldonitaj aŭ komplete ŝanĝitaj. La grizaj partoj estas la produkto de koncepta, kaj ne preciza, tradukado. Post la apero de tiu artikolo en Fars News, CNN aldonis noton, ke la video estas nur el ĉerpaĵo de la tuta intervjuo. Tamen ne estas evidente al mi, ĝuste kiel tio klarigus la diferencojn.

Laŭ Fars News, kiam CNN publikigis la intervjuon centoj da novaĵagentejoj, televid- kaj novaĵ-kanaloj, retejoj kaj retblogoj dissendis tiun titolon: "Irana Prezidento Ruhani nomas Holokaŭston 'reproĉinda' krimo kontraŭ la judoj", titolo citita de CNN, aŭ "Ruhani agnoskas la Holokaŭston kiel krimon kontraŭ judoj".

Simile oni faris pri la prelegoj de Ahmadinejad, sed tiam oni troigis liajn asertojn por aspektigi lin kiel frenezulon; nun oni tordas la vortojn de Rouhani por aspektigi lin kiel simpatiulon kun la Okcidento. Mi jam legis lian prelegon en UN en verŝajne fidinda traduko antaŭ ol aŭskulti la televidnovaĵojn, do mi tuj sciis, ke estas io malĝusta en la raportado.

Oni ne miru, ke tiaj mistradukoj aperas, kiam oni konsideras la misraportadon eĉ kiam ne necesas traduki tekstojn. Renoma veterana usona raportisto Seymour Hersch antaŭ nelonge, en prelego al studentoj de ĵurnalismo ĉe la universitato City University en Londono deklaris, ke necesas fermi novaĵagentejojn NBC kaj ABC, kaj maldungi 90% de la redaktoroj (<http://www.theguardian.com/media/media-blog/2013/sep/27/seymour-hersh-obama-nsa-american-media>). Mi havas iom similan senton ankaŭ pri la brita ĵurnalismo.

Ian Fantom

## **INTERNACIA KALENDARO – LISTO PRI ESPERANTO-RENKONTIĜOJ**

Kiam, kie, kio okazas? - La "Internacia Kalendaro" listigas ĉiujn konatajn Esperanto-renkontiĝojn, kongresojn, festivalojn, kiuj akceptas vojaĝemajn esperantistojn kiel partoprenantojn.

La Kalendaro havas 2 ĉefajn avantaĝojn:

- Individuaj esperantistoj povas trovi en unu loko la ĉefajn informojn pri ĉiuj Esperanto-aranĝoj, kun iliaj retejoj kaj kontakt-adresoj de la organizantoj. Krome, oni povas vidi laŭdate najbarajn aranĝojn kaj efike plani sian vojaĝadon.
- La organizantoj (krom efike reklami sian aranĝon) povas informiĝi pri datoj de tempe kaj geografie proksimaj renkontiĝoj, kaj povas eviti koliziojn.

La registrado de novaj aŭ mankantaj renkontiĝoj estas senpaga kaj simpla afero pere de formularo en la komenco de la kalendara listo. Indas registri ankaŭ la malgrandajn, lokajn renkontiĝojn, ja tio donas ŝancon por eventualaj eksterlandaj esperantistoj, ĝuste tiutempe turismantaj en la proksimeco trovi kontakton kaj partopreni vian aranĝon.

La Internacian Kalendaron funkciigas teamo de la Esperanto-Centro "Eventoj/Lingvo-Studio" en Budapeŝto. La Kalendaro funkcias jam ekde 1996, kaj enhavas jare ĉ. 250 Esperanto-aranĝojn (en 2012: 244 aranĝoj, en 2013 ĝis nun: 194).

Kiel vi povas helpi?

Adreso de la Internacia Esperanto-Kalendaro: <http://www.eventoj.hu/kalendaro.htm>

Szilvási László

## **CHURCHILL KAJ LA DOMINO DE LA ANGLA**

Multaj homoj ne scias, nome, ke Churchill *celis* domini la mondon per la angla lingvo. Tiu dominado ne okazis hazarde. Li estis ege fiero ne nur pri la brita imperio, sed ankaŭ ke lia patrino estis usonanino, kaj lia patro estis eminenta aristokrato. Li estis tre kapabla ĵurnalisto, kaj pro konstanta praktiko li fariĝis bonega aŭtoro de elstara historio de anglalingvanoj.

Ĝis la fino de la unua mondmilito, la franca lingvo dominis la mondon, sed pro usona partopreno en tiu milito, la fina traktato verkiĝis kaj en la angla kaj la franca. Tial, dum la dua mondmilito, Churchill kuraĝigis usonan partoprenon, konsilante al usonanoj ke ili, kune kun britoj, povus gajni multon, komerce kaj politike, per popularigo de la angla lingvo.

Mi estas denaska anglo, 86-jara, edukita en Anglio kaj dum mia knabeco mi lernis fieregon pri la brita imperio, sed kiam mi ekscipovis Esperanton, kiel kvardekjarulo, kaj loĝis en la domoj de eksterlandanoj, mi lernis kiom ili ofendiĝis prio la domino de mia denaska lingvo, kaj la neceso elspezi multajn jarojn en siaj lernejoj por lerni komplikaĵojn kiujn mi sorbis kun la lakto de mia patrino.

Nun mi hontas ke homoj devas lerni mian lingvon por sukcesi en edukado, politiko kaj komerco, kaj dum kvardek jaroj mi kampanjis en Britio por la starigo de Esperanto en britaj lernejoj, por ke estontaj generacioj konstatu ke ekzistas bonega solvo de la problemo de lingva justeco. La plimulto de la nuna generacio kredas ke eksterlandanoj preferas la anglan ĉar ĝi estas facile lernebla!

David Curtis

## MONDA PUPEKSPozICIO 2013 3N URBO HIGASHIKAGAWA



La Vojevodo de Silezio (Pollando) sendis al la Nova Turisma Asocio en la urbo Higashikagawa (Kagawa, Japanio) <http://www.hnt.or.jp> paron da pupoj en tradiciaj vestaĵoj de tiu regiono. La virpupo vestas la uniformon de sileziaj ministoj fine de la 19a jarcento, nigra kun orkoloraj ornamaĵoj kaj nigra ĉapo. La virinpupo portas la tipan florgirlandon ĉekape, longan jupon kaj antaŭtukon kun belaj florbrodaĵoj. La pupoj estos montrataj dum la 3a Monda Pupekspozicio, kune kun pli ol 60 aliaj el Pollando. La kolekto, farita danke al Esperantistoj tra la mondo, kalkulas je ĉirkaŭ 800 pupoj el 42 landoj.

La ekspozicio okazos inter la 28a de septembro kaj la 6a de oktobro 2013 en la sidejo de la organizo, en Hiketa (Izutsu Yashiki, 769-2901 Higashikagawa, Hiketa 2163, Japanio; Tel. +81 879-238557). Okaze de la Malferma Ceremonio ĉeestos la Ambasadoro de Pollando en Japanio, S-ro Caryl Kozaczewski. La Ministerio pri Kulturo kaj Nacia Heredaĵo de la Pola Respubliko kaj la Ambasadoro de Pollando en Tokio aŭspicias la eventon.

Specialaj gastoj estos du polaj studentoj el Vroclavo, S-ino Karolina Leontowicz kaj S-ro Mateo Kulka, ambaŭ aktivaj Esperantistoj, kies ĉefa tasko estos agi kiel Pupdiplomatoj donante intervjuojn al la lokaj kaj naciaj amaskomunikiloj, per montrado de polaj naciaj kostumoj, ktp.

Etsuo Myoshi

## LA 36-A KATALUNA E-KONGRESO

La venontajn 1-an, 2-an kaj 3-an de novembro (fakte ankaŭ la 31-an de oktobro), okazos en Salardú (Val d'Aran) la 36-a Kataluna Kongreso de Esperanto kaj 1a Okcitan Kongreso de Esperanto.

2013 estas la jaro de Okcitanio: [plurajn historiajn eventojn oni festas ĉi-jare](#). Aldone al ĉio ĉi, Okcitanio kaj Katalunio estas tre ligitaj landoj. Lingvoj kaj kulturoj, foje ne reciproke konataj, estas ĝemelaj. Historiaj rilatoj estas konstante, el la trubaduroj ĝis la akceptado de rifuĝintoj de la hispana milito.



La buĝeto de la kongreso estas ekstreme kriza, sed tamen la antaŭvidita programo estas riĉega kaj interesa. Ĝi ĉefe pritraktos la okcitanan kaj la lingvajn malplimultojn ĝenerale, sed ankaŭ socion. Estos koncerto de JoMo, arta vespero kaj belegaj ekskursoj. Elstaras la partopreno de Kevin de Laet, Jacme Taupiac, JoMo Leclercq, Floreal Martorell, Xavi Rico, Abel Montagut...

Mi petas vin aliĝi kiel eble plej frue, tio multe helpos la organizantojn. Pliaj informoj kaj aliĝoj ĉe [www.esperanto.cat](http://www.esperanto.cat)  
Ĝis baldaŭ en Okcitanii'

Feriol Macip i Bonet

## SOMERA UNIVERSITATO POSTSOMERE

Ĝi okazos de la 25-a ĝis la 28-a de oktobro 2013 en Greziljono. La lasta antaŭ la eŭropaj balotoj de 2014 (restas ankoraŭ 7 monatoj)! Pli da informoj kaj aliĝo ĉe mi aŭ prefere en la retejo: <http://e-d-e.org/post-Somera-Universitato-en?lang=eo>.

Vi povas eĉ resti ĝis 7 tagoj, kun viaj infanoj kaj genepoj, por helpi kursojn kaj aktivaĵojn en Esperanto en la kastelo Greziljono. Informoj pri 'Aŭtune' en Greziljono.

<http://gresillon.org/autune>

Bert Schumann

**Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**

Finredaktita: la 30-an de septembro 2013

Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Maja Tišljar, Jozefo Reinvart, Ian Fantom, Szilvási László, David Curtis, Etsuo Miyoshi, Feriol Macip i Bonet, Bert Schumann.

Kontakto: [ztisljar@gmail.com](mailto:ztisljar@gmail.com)

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

